



Helga Plötner loĝas kun edzo Manfred Reyher sude de Berlin en Gräfenhainichen (Sachsen-Anhalt) kaj instruas pentradon kaj Esperantonen kursoj kaj private en sia propra ateliero.



Mi kaj mia edzo Manfred Reyher

Ekspozicioj dum Internacia Somera Esperanto-Universitato en Bulgario en 1986, UK en Varsovio en 1987, UK en Berlino en 1999, Germana Esperanto-Kongreso en Hamelena en 2015 ktp.

Ekde mia esperantistiĝo en 1980 portretadis enlandajn kaj eksterlandajn esperantistojn. Ĉiam labora kun KREDO, AMO. Kaj ESPERO por PACO.

La redaktanto Hori Jasuo skribis:

Mia unua renkontiĝo kun Helga okazis dum la 100a UK en Lille, Francio, en 2015. Poste ni komencis interŝanĝi retmesaĝojn tre ofte, kaj iun tagon ŝi portretis min laŭ la foto aperinta en Fejsbuko. Ŝi plu portretis aliajn esperantistojn kaj sendis al mi iliajn portretojn. Tiam en mia kapo aperis ideo eldoni libron kun tiuj artaĵoj. Kaj la unua libro aperis en julio 2020. Ŝi volis eldoni la duan libron kaj komencis energie portreti. Jen la rezulto kun belaj portretoj de 16 geesperantistoj, al kiuj mi dankas pro ilia kunlaboro. Lastetempem Helga suferas pro malsano kaj estas iom pesimisma, sed mi forte kredas, ke ŝi resaniĝos kaj povos ekportreti por la tria libro.

La personoj estas

1. ZAMENHOF, Ludoviko (Pollando),
2. CORSETTI, Renato (Italujo),
3. GROSJEAN, Mireille (Svisujo),
4. Ilia Dewi (Indonezio),
5. JANSSEN, Nicky (Belgio),
6. KADIFELI, Vasil (Turkujo),
7. LEE, Jungkee (Koreio),
8. LOSKUTOVA, Tatjana (Rusio),
9. LOWENSTEIN, Anna (Britujo),
10. OŜIOKA, Moritaka kaj Taeko,
11. PYHALA, Raita (Finnlando),
12. SABIYUMVA, Jêremie (Burundo),
13. VERGARA, Jose Antonio (Ĉilio),
14. WU, (Guojiang (Ĉinio),
15. ZALESKI-ZAMENHOF, Margaret (Francio)





Biografio

1945: naskiĝis en (Grâfenhainichen en

Ekde la 3a jariĝo pentris gaje.

Ekde la 14-jariĝo ekzercis portreti laŭ modeloj.

Ekde la 17-jariĝo estis membro en pentroklubo.

1970: naskis filinon Jana.

1974-1978: studis en Speciala Distrikta Kulturakademio de Halle/Saale kun sukcesa fino:

Gvidantino en Popola Artkreado por la fako pentroarto kaj grafiko.

1980: esperantistiĝis.

1988-1989: studis en la Akademio pri Arto en Dresdeno.

Ĝis nun: Instruis por diversaj artkursoj. pentris kiel liberprofesia portretpentristino homojn, pejzaĝojn, florojn, bestojn kaj domojn laŭ modelo aŭ laŭ fotoj, pentris je privataj komisioj.

Bonŝance, ankaŭ iu bonkora feino ĉeestis tiun kongreson. Ŝi decidis uzi sian miraklan povon, magian bastoneton, por instrui al mi Esperanton. Tiu feino estas Katalin Kovats, mirinda profesoro, talenta virino.

Ni renkontiĝis ne tuj en 2015, sed kelkajn jarojn poste, en Lisbono, en 2018. Ŝi proponis helpi min lerni Esperanton. Dum la sekva jaro ni studadis kune preskaŭ ĉiutage. Estis facile, ĉar ni amikiĝis kaj kun entuziasmo kaj plezuro babiladis, vizitadis unu la alian, fariĝis nedisigeblaj. Ni vojaĝis kune al Raleigh, kie mi ekzameniĝis. Dum la sekva UK en Lahti, Finnlando, ŝi transdonis al mi dum la oficiala kongresa malfermo mian KER-atestilon. Tio estas mia grandvalora ŝlosilo por eniri Esperantujon.

Mia leteramiko HORI Jasuo havis grandan intereson pri miaj portretoj. Li havis tiun bonan ideon fari librojn kun miaj portretoj de esperantistoj el diversaj landoj kun iliaj eseetoj. Nun eldoniĝos la dua verda libro post la sukceso de la unua ruĝa libro.

Ni intencis eldoni la trian, kvaran librojn, ĉar multaj meritis enesti. Sed mi estas tiel malsana kun doloregoj, ke mi ne plu povos portreti.

Mi laboradis en amo al ĉiuj esperantistoj. Vidu, ĝuu tiujn du librojn.



Friedrich-Ebert-Str. 9, 06773 Grâfenhainichen,

Tel. +49 173 77 31 545

helga.ploetner@gmx.de

